


espero katolika

rm



monata revuo
fondita en jaro
1903
oficiala organo
de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA
UNUIĜO ESPERANTISTA

internacia katolika unuiĝo esperantista

fondita en 1910
honora prezidanto:
pastro A. Beckers

Centra Oficejo
CH-9106 Zürchersmühle - Urnäsch
Svislando

Oficiala Revuo
Espero Katolika
(Fondita en 1903)

Redaktoro:
P. Felice Ruaro
37010 Costermano (Vr)
Italujo

Abonkotizo
sFr. 14,=

VATIKANA RADIO

La dissendado de la Vatikana Radio komenciĝis antaŭ 43 jaroj, precize la 12-an de februaro 1931, kiam la itala scienculo Guglielmo Marconi preparis kaj metis antaŭ la Papon Pio XI la novan mikrofonon. La Papo sendis tiam la unuan papan radiomesaĝon.

Hodiaŭ oni dissendas meznombre dum 20 horoj ĉiutage en 32 lingvoj. Okaze de la Sankta Jaro estas jam preta stera dissendilo por daŭra programo. Jam de januaro la Vatikana Radio dissendas rekte sur mezaj mal-longaj ondoj la renkontiĝon de la Papo kun la fideluloj en Placo S. Petro; tial oni povas diri, ke la tuta mondo povas preĝi la Anĝeluson kun la Papo.

En la kvar sidejoj de la Radio laboras 266 homoj: 18 en la ĝenerala direk-cio, 144 por la nacilingvaj programoj, 30 por la komunaj informoj, 74 en la teknika sektoro.

Ĝenerala direktoro estas P. Roberto Tucci, jezuito kaj teologi-profesoro, kiu dum 14 jaroj direktis la vatikanan revuon *Civiltà Cattolica*.

La programoj estas en du grupoj: programoj je internacia karaktero (inter kiuj radio-informoj en 7 lingvoj, Sankta Meso kaj Rozario latine, koncertoj ktp.) kaj nacilingvaj programoj, kiuj estas 36 kaj estas dissen-dataj en 32 lingvoj en la 5 kontinentojn.

La Vatikana Radio estas la unika radio sen abonintoj, sen impostoj, sen reklamo; ne faras politikan propagandon.

Tiuj, kiuj ĉi tie laboras, ne riĉiĝas. La parolantoj devas deveni de la lando, al kiu ili parolas, kaj kelkfoje ili reiras en sian landon por refre-ŝigi sian lingvon. Tio estas malfacila por naskiĝintoj trans la ferkurteno. La duono de la nacilingvaj programoj direktiĝas al la landoj de la Orienta Eŭropo kaj plue estas la programo por Ĉinio.

P. Tucci diris: «De ni ili atendas multajn informojn pri la Eklezio, volas scii, ke ĝi ankoraŭ vivas kaj ne forgesas ilin; poste ili atendas respon-

dojn al siaj problemoj, kiuj estas malsamaj ol la problemoj de la okcidenta mondo. Ili multe interesiĝas pri la rilatoj inter scienco kaj religia kredo, precipe tie, kie la marksisma ideologio instruas, ke la scienco detruas la kredon».

Prof. Pali, kiu prizorgas la programon por Albanio, diris: «En multaj orientaj landoj la aŭskulto de la Vatikana Radio estas danĝera; en Albanio ĝi estas delikto. Ĉiuj religioj tie estas malpermesitaj, nur 10 elcentoj estas katolikaj, sed ankaŭ multaj aliaj aŭskultadas la Vatikanan Radion, ĉar ĝi estas la unika voĉo, kiu parolas tutlibere».

Ankaŭ Mons. Petro Tchao, kiu prizorgas la ĉinan programon, diras, ke multaj ĉinoj aŭskultadas la Vatikanan Radion malgraŭ la severa kontrolo. Litova parolanto diras, ke en Litovio 30 elcentoj aŭskultadas la liberan Voĉon de la Vatikano.

«Niaj aŭskultantoj ĝuas iom da libereco», diras Roman Rws, la plej maljuna parolanto ĉe la Vatikana Radio: li estas el Jugoslavio. Li ricevas multajn leterojn, inter aliaj skribis kamparano: «Ni estas ses personoj, je la horo de la vatikana programo ni finas nian laboron kaj kiam vi diras: Bonan vesperon, karaj aŭskultantoj, ni respondas: Bonan vesperon, kara sinjoro!».

Stefan Filipowic, kiu prizorgas la polan programon, diras: «Ni havas ĉ. milionon da aŭskultantoj. La dissendoj ne estas embarasataj. Mi opinias, ke Polujo estas la eŭropa lando, en kiu la katolika sento vibras plej forte. Nia Primaso parolas en Polujo pli forte ol ni povas al ni permesi ĉi tie». Ĝisnun, kiel oni diris al ni plurfoje, ne estis eble dissendi esperantlingve. Ni esperas, ke venos la tago, kiam la Vatikana Radio dissendos programojn en Esperanto. Tiu tago estos belega tago por la esperantistoj, precipe por ni IKUE-anoj. Ni faru lokon al optimismo en nia koro: ĝi movas nin kredi, ke iam ni aŭdos: «Karaj aŭskultantoj, laŭdata estu Jesuo Kristo!».

La Redaktoro

A N O N C O

Patro Jacobitti sciigis per K.S. ke post malmultaj monatoj estos preta la nova misalo. La sciigo plaĉos precipe al la pastroj.

Programo de nia Kongreso

Temo de la tria Kongreso de Kristanaj Esperantistoj: «Li la Majstro, ni la fratoj».

Sabaton 20. VII

- 11 Kunsido de estraranoj kaj funkciuloj.
- 17 Gazetara konferenco.
- 20 Interkona vespero.
- 22 Vesperpreĝo.

Dim. 21. VII

- 9,15 Kanthora ekzerco.
- 10 Solena inaŭguro. Bonvenigo fare de la prezidantoj de IKUE, KELI, LKK, komuna kaj ĥora kantado, salutparolado de Dr. Bormann, salutoj fare de reprezentantoj de ĉeestantaj lingvo-grupoj.
- 13,30 Vizito al «Rauhes Haus» (per aŭtobuso).
- 17 Ekumena Diservo en Ansgar-preĝejo. Prediko: J. Lukats (Hung.).
- 20 Vespero de kanto kaj amikeco.
- 22 Vesperpreĝo.

Lundon 22. VII

- 8 Matena Diservo.
- 9,15 Prelego I (F. Ruaro, redaktoro de EK, kaj André Bachelier) kun diskuto gvidata de Wim Koopmans. Temo: «Li la Majstro, ni la fratoj».
- 14 Estrarkunvenoj. Por la aliaj: libera post-tagmezo.
- 20 Vespera programo.
- 22 Vesperpreĝo.

Mardon 23. VII

- 8 Matena Diservo.
- 9,15 Prelego II «Kiu kaj kie estas la fratoj?».Dr. Kl. Perko kaj Anna Sandgren. Gvidos la diskuton Reg. Bedford.
- 14 Grupkunvenoj, kantado ktp.
- 20 Vespera programo.
- 22 Vesperpreĝo.

Merkredon 24. VII

- 9,30 Tut-taga ekskurso al Ohlstedt, Wohldorf, Duvenstedt.
20 Varioplena artista programo.
22 Vesperpreĝo.

Ĵaŭdon 25. VII

- 8 IKUE: Meso; KELI: Diservo kun Sankta Manĝo.
10 Ĝenerala kunveno de IKUE, jarkunveno de KELI.
Post-tagmeze daŭrigo de la kunvenoj.
20 Vespera programo.
22 Vesperpreĝo.

Vendredon 26. VII

- 8 Matena Diservo.
9,15 Prelego III: «La majstreco de Jesuo en la praktiko» (Jelli Koopmans kaj W. Mudrak). Gvidos la diskuton Frato Marmou.
14 Urba kaj havena rondveturado buse kaj ŝipe.
20 Adiaŭa vespero kun distra programo.

Sabaton 27. VII

- 9,30 Ekumena Diservo.
10,45 Fermo de la Kongreso.



Diras viro al sia edzino:

«Mi serioze pensas, ke eble mi vendos mian aŭton ĉar mi ĵus legis en la ĵurnalo, ke denove plialtiĝas la prezo de benzino».

La edzino respondas:

«Sed tio ne gravas por vi: neniam vi aĉetas pli ol dek guldenojn da benzino».



Tri homoj batalis inter si furioze. Alia homo diras:

«Kamaradoj, mi konas frazon, kiu repacigos vin: venu kun mi en la bierejon; mi pagas por ĉiuj».

Vento por nia muelilo

NIA MOVADO POSTULAS FAJRON DE APOSTOLO

En sia prelego en la kadro de trilanda renkontiĝo en Eindhoven (Nederlando) s-ano Wensing diris interalie:

«Malgraŭ la senĉese pliakriĝanta lingva situacio en internaciaj konferencoj, scienco, diplomatio, interregistaraj organoj, sportaj medioj, komerco kaj industrio, la ekstera mondo obstine rifuzas serioze cerbumi pri ajna solvo de tiu problemo, ŝajne preferante la komplikajn monrabajn servojn de interpretistoj kaj tradukantoj, kvazaŭ ne ekzistus racia solvo.

Pro malfacile klarigeblaj kaŭzoj la Esperanto-movado ankoraŭ ne sukcesis ekstermi la falsajn kaj erarajn opiniojn pri nia lingvo kaj ĝiaj celoj. Tio, miaopinie, ŝuldiĝas al du faktoroj: al la troa introvertiteco de nia agado kaj al nia malkapablo defendi kaj pravigi nian aferon per trafaj kaj konvinkaj argumentoj.

Movado kiel la nia postulas de siaj adeptoj batalemon, informitecon, la fajron de vera apostolo. Ni esperantistoj volonte elviviĝas en literaturo, en gramatikaj aŭ stilaj ĵonglaĵoj. Ni vizitas fidele la ĉiujarajn Universalajn Kongresojn, frekventas la lokan klubon por distriĝi kaj amuziĝi. Sed nur sporade ni cerbumas aŭ krakigas al ni la kapon pri tiu plej elementa devo de la vera esperantisto, nome disvastigi informadon pri la celoj de nia lingvo, konvinki la kontraŭulojn, venki la indiferentecon pri la monda lingvo-problemo. Se ni ne elpaŝas eksteren, pli kuraĝaj, pli agresivaj, pri konvinkitaj pri la nepreco de baldaŭa solvo de la problemo de interhoma komunikado, kiel ni gajnu kaj altiru novajn adeptojn, kiel ni fortigu nian pozicion, kiel ni amasigu nian movadon? Se ĉiu esperantisto konsiderus sia devo la varbon de almenaŭ unu nova membro aŭ simpatianto ĉiujare, UEA havus pli ol 60.000 membrojn jam venontjare, 120.000 post du jaroj kaj kvaronmilionon post tri jaroj. Sed la plorinda kaj hontinda fakto estas, ke UEA havis en 1960 ĉirkaŭ 32.000 membrojn kaj hodiaŭ, 13 jarojn poste, ankoraŭ 32.000».

Wensing ekzamenis la minacon de aliaj mondlingvoj, precipe de la angla: «En televido, reklamoj, kanzonoj k.t.p. la angla minacas niajn naciajn

lingvojn; ni eĉ ne plu penas trovi nacilingvajn ekvivalentojn por multaj vortoj...».

Poste la aŭtoro rimarkas, ke Esperanto devas leksikologie disvolviĝi «por plenumi la pontligvan rolon en ĉiuj branĉoj kaj sub-branĉoj de scienco, tekniko, komerco, industrio, sporto, diplomatio, juro k.t.p.».

Fine Welsing rimarkas kun malĝojo, ke nia movado estas treege malforta pro la manko de mono. «Tiu malriĉeco estas certe unu el la precipaj kaŭzoj, kial plejgrandparte la farendaj taskoj falas sur la ŝultrojn de volontuloj, kiuj spite sian sindonon ofte ne posedas la kvalifikaĵojn por taŭge plenumi gravan kaj respondecajn taskojn. Pro tio multe en nia movado ne estas farata aŭ estas farata amatorece kaj maladekvate... Mono regas la mondon, kiel diras proverbo, kaj mono plenumas ĉiujn oficojn, diras alia proverbo».



P. H. Paruzel ((Pollando):

Estas bone, ke vi sendis mian adreson al s-ro D. De Boer, kies vortoj tute ne elĉerpas mian starpunkton.

IKUE-Keli-anoj kunvenu aparte, ekumene, fratece, sed en la kadroj de U-Kongresoj, kie aperas ne nur katolikoj kaj protestantoj. La dialogo kun kri-

stanoj, Di-infanoj kaj la nuntempa mondo, inter ĉiuj konfesioj, religioj kaj la sendiuloj havu lokon tie, kie ĉiuj sentas sin esperantistoj. La nekristanoj vidu, kiom la disĉiploj de Kristo amas sin reciproke!

Ŝajnas al mi, ke tiel pensas ankaŭ la estraroj de IKUE kaj KELI.

P. Felix Stricki (Jugoslavio):

Pro tio ke la prezidanto kaj la redakcio konstatis, ke belulinoj ŝanĝas plurfoje sian robon, verŝajne ili volis ŝanĝi la veston de tiu belulino, kiu nomiĝas Espero Katolika... Kiel mi legis en la numero 7-8 de EK 1973, la artikolo de P. H. Paruzel multe plaĉas al mi: miaj ideoj estas preskaŭ la samaj. Mi ankaŭ firme kredas kaj vidas, ke centro por IKUE en Romo fariĝus rapide kongregacio de apostoloj, de justeco kaj paco.

Aleš Berka (Ĉeĥoslovakio) skribis al la prezidanto:

Vere maloftaj estas niaj skribaj kontaktoj. Miaopinie estus necese esti en daŭraj almenaŭ ĉiumonataj kontaktoj. Nia IKUE-sekcio aranĝos en la kadro de III E-Kultura Festivalo en Opava (5-8 VII) jarkunvenon kun elekto de la estraro.

Vi, kara Prezidanto, ĉeestis lastan nian Jarkunvenon en Vsetin. Estu tiel afabla kaj venu denove al nia Jarkunveno en Opava. Via partopreno estos granda festo por nia membraro...

LA NOVAJ MESTEKSTOJ EN ESPERANTO

Sukcesplene Patro G. Jacobitti O.P. en Romo finfaris grandan kaj plurjaran laboron! Je la 23a de januaro 1970 li sendis enkondukan leteron kun la unua sendaĵo de kelkaj tekstoj: «Post la renovigo de la liturgio de la meso ankaŭ niaj ĝisnunaj esperantaj tradukoj ne plu validas. Pro tio ni devas ĉion renovigi kaj nuntempigi».

Tiam li sciis kiom da persista laboro lin atendis, Precipe la dua alineo de tiu letero tion mencias: «Bedaŭrinde ankaŭ ĉi tiu teksto ne estas definitiva; unue ĉar en ĉi tiu mankas la aliaj legaĵoj, kiujn oni uzos en la venontaj 1971

kaj 1972, tio estas dum la trijara ciklo de la mesliturgio; due ĉar la tuto bezonas novan revizion kaj la prespermeson. Sed dume ni jam uzas en Romo ĉi tiun tekston provizore, ĝis ni havos nian plenan esperantan misalon».

Kaj sekvis en 1970: 75 mestekstoj kun la legaĵoj de la ciklo B. En 1971: same kun la legaĵoj de ciklo C.

Fine en 1972: la kompleta kolekto por ĉiuj dimanĉoj kaj plej gravaj festoj. Krome samtempe kun ĉiuj legaĵoj de la cikloj A, B, C! (Nro 1-76).

Jen tre bonvena aranĝo: ĉiu dimanĉo aperas en propra kajereto kelkpaĝa,

en kiu troviĝas la legaĵoj kune laŭ la tri cikloj. Tiamaniere ili restas ĉiam uzeblaj. Tiu ĉi aranĝo same estus dezirinda por aliaj nacilingvaj liturgiaj eldonoj. Kiel dirite, la nuna kolekto estas komplete rilate la tekstojn por ĉiuj dimanĉoj kaj la plej gravaj festoj. Certe tiu kolekto tute sufiĉos por ĉiuj kunvenoj de esperantistoj ĉu grupaj, ĉu regionaj aŭ internaciaj.

Jen la impona enhavo de la kajeretoj:

- I. Ordinara Parto kun la ĉiutagaj tekstoj kaj la 2a kanono.
 - II. 12 Prefacoj.
 - III. Kanonoj; la oficialaj tekstoj de ĉiuj kvar kanonoj.
- 1-4 Advento, rilate la 1an ĝis 4an dimanĉojn.
 - 5-10 Kristnaska Tempo. Kun tekstoj por Kristnasko (Antaŭtaga Meso, Meznokta Meso, Meso de la Aŭroro, Meso de la Tago), Dimanĉo dum la tagoko de Kristnasko, Soleno de la sankta Dipatrino Maria, Dua Dimanĉo post Kristnasko Epifanio, En la festo de la bapto de l'Sinjoro.
 - 11-16 Karesmo, rilate la 1an ĝis 5an dimanĉojn, kaj Palmodimanĉo.
 - 17-28 Paska Tempo. Paska Dimanĉo, Lundo post Pasko, 2a ĝis 6a Paskaj Dimanĉoj, Pentekosto (Antaŭtaga Meso, Pentekosta Dimanĉo), Soleno de la Tre Sankta Triunuo, Soleno de la Sanktegaj Korpo kaj Sango de Kristo.
 - 29-61 2a ĝis 34a Jartempaj Dimanĉoj.
 - 62 Festo de la Prezento de la Sinjoro. 2-2
 - 63 Festo de la Anonco de la Sinjoro. 25-3
 - 64 Transfiguriĝo de l'Sinjoro. 6-8

- 65 Festo de la gloro de la Kruco. 14-9
- 66 Dediĉo de la Laterana Baziliko. 9-11
- 67 Ĉielenpreno de Maria. 15-8 (kun Antaŭtaga Meso)
- 68 La Senmakula Koncipiĝo de Maria. 8-12
- 69 Soleno de Sankta Jozefo. 19-3
- 70 Je la Naskiĝo de Johano la Baptisto. 24-6 (Kun Antaŭfesta Meso, kaj en la Festa Tago).
- 71 En la Soleno de la Sanktaj Apostoloj Petro kaj Paŭlo. 29-6 (Kun Antaŭfesta Meso, kaj en la Festa Tago)
- 72 Soleno de Ĉiuj Sanktuloj. 1-11
- 73 Vota Meso por Nupto. (Kun la rito de la Geedziĝa Sakramento).
- 74 Meso por la Mortintoj.
- 75 Vota Meso por Paco kaj Justeco.
- 76 Vota Meso por Unuiĝo de la Kristanoj.

La partoj I, II, III do koncernas la ĝeneralan uzadon; el la ceteraj oni elektu unu laŭ la dato.

Kiuj deziras mestekstojn por kongreso aŭ similaj okazaĵoj, tiuj tamen bonvolu mendi ilin almenaŭ du monatojn antaŭe! Ĉiuj kajeretoj aperis en sama, konvena formato de 21 cm x 15 cm. Ili estas bele presitaj laŭ ofseta procedo en klara aranĝo. Kaj ili aperis «Kun Eklezia Aprobato».

Ne estas eble indiki la prezon. ĉar tiu dependas de la kvanto mendita; krome la nombro da paĝoj de la diversaj kajeretoj ne estas egala.

P. Wannemakers
(VVV)

Der Herr der Welt

(*La Sinjoro de la mondo*)

Benson naskiĝis la 18.11.1871 en Wellington College (Berkshire, Anglujo) kiel la plej juna filo de la anglikana ĉefepiskopo. Li vizitis la faman Eton College. Kiel anglikana vikario laboris en iu de la Londona Malriĉula Kvartalo. En la jaro 1903 li katolikiĝis kaj fariĝis en la jaro 1904 pastro. Post studado en Romo li dediĉis sin antaŭ ĉio al la verkado. Li mortis en la jaro 1914 en Salford (Lancaster). Liaj historiaj romanoj el la tempo de la konfesiaj konfuziĝoj same kiel ankaŭ la konvertiĝromanaj estas kolorplenaj kaj saturitaj de streĉiĝo; liaj spirithistorioj estas katenaj. «La Sinjoro de la mondo» estas lia plej signifa verko.

En tiu ĉi futurromano desegnas Benson vizian, spirretenan bildon de la lastaj tagoj de la Tero.

La Sinjoro de la mondo konkeris la korojn de ĉiuj popoloj en ŝtormo. Li ĉesigis, la «Savinto de la homaro», kun sukceso preskaŭ nekredebla la abismon ŝajne eternan inter Oriento kaj Okcidento, liberigis la mondon de la terura alpremo de minacanta potenĉbatalo inter la du gigantaj mondblokoj. La homaro kuŝas antaŭ liaj piedoj. Ĝi festas la alvenon de la eterna mondpaco en jubilo kaj la alvenon de la elstaranta produkto de la humana evoluo.

La kristanismo ŝajnas esti superita. Ĝian lokon okupis la Humana Religio, en kiu la Homo mem estas la plej ĉefa Estaĵo. Ĉi tiu religio estas deviga por ĉiuj landoj de la Tero. Tiel ĝin volas la Sinjoro de la Mondo.

Tamen la malgranda aro de la kristanoj, kiuj ankoraŭ kontraŭstaris al la erariga Evolureligio, detenas sin de la novaj Altaroj. Tiamaniere pensas la Sinjoro de la mondo, ke li devas sian politikon al logika fino gvidi; Romo devos esti detruata, ĉiuj kristanoj devos esti neniigataj per la humana vojo de la eŭtanazio.

Multnombraj katastrofoj ĉie sur la terglobo intertempe montras la bi-

bliajn antaŭsignojn de la alproksimiĝanta mondpereo. La lastaj kristanoj komencas ekkompreni kun teruro, kiu estas envere tiu ĉi Sinjoro de la mondo. Kaj dum tiu ĉi sin preparas al neniiga bato kontraŭ la lasta Papo kaj la malgranda nombro da Fideluloj, malaperas la Mondo kun ĉiuj siaj pompoj.

Kaj nun kelkaj citaĵoj el la libro, kiuj koncernas Esperanton:

«Ŝajnas esti nun certe, ke la leĝo pri la enkonduko de Esperanto por ĉiuj ŝtataj aferoj en junio estos proponita». paĝo 19.

La gigantaj elektraj informskriboj super Londono disvastigis la okazintaĵojn jam en Esperanto. paĝo 35.

Alte supre, sub la horloĝo, sur la giganta informtabulo de la Registaro li legis en Esperanto kaj angla la informon, kiun Anglio jam tiel longe atendis... «Grupkolektiĝoj en Oriento estas ĉesigitaj. Paco, ne milito. La internacia frateco estas restarigita. Felsenburgh estos hodiaŭ vespere en Londono». paĝo 46.

La latina lingvo devos esti denove la sama por la Eklezio, kio estas Esperanto laŭŝajne por la alia mondo. paĝo 76.

Ĝi estis freŝe farita monero. Sur la una flanko ĝi montris la konatan kronon kun la vorto «Fivepence» en la mezo kaj sube la saman desegnon en Esperanto, sur la alia flanko la profilon de iu viro kun surskribo: JULIAN FELSENBURG, LA PREZIDANTO DE EŬROPO. paĝo 91. Ŝi (Mabel, edzino de Oliver, adepto de la Prezidanto) aŭdis kelkajn vortojn... kiuj anoncis en Esperanto: «Anglianoj! Mi permesas la leĝopropozonon pri la Diservo». paĝo 101.

«La vespermanĝo estos servata en duonhoro, gesinjoroj» — diris li (la flugmaŝinkelnero) en Esperanto, kiel ĝi ĝenerale sur ĉiuj fluglinioj estis kutimo»... paĝo 119.

Esperantistoj ĉie en la mondo! Legu tiun ĉi unikan romanon en via propra lingvo. Certe vi trovos ĝin, se vi serioze klopodos.

Dr. J. Kondor (Germanio)

— Onklino, kial vi ne havas infanojn?

— Nu, infaneto, ĉar la cikonio neniun al mi alportis.

— Ho, pro tio! Se vi ankoraŭ kredas tiajn fabelojn, vi neniam ĝisatendos ilin.

KUNVENO POR PASTROJ EN RIMINI

En la tagoj 28-29-30 de la pasinta aprilo okazis en Rimini studkunveno por Pastroj organizita de la itala katolika unuiĝo esperantista, filio de IKUE.

En la unua tago ĉeestis la prezidanto de IKUE, p. F. Longoni, kiu prelegis pri la temo de la kunveno: «esperanto taŭga rimedo por la evangelizado».

Antaŭ reprezentantoj de diversaj italaj diocezoj kaj kelkaj religiaj ordenoj, oni prezentis interesajn spertojn pri esperanto kaj bibliaj studoj, turismo, elementa lernejo, ekumenismo, liturgio.

Respektive raportis: prof. Angelo Duranti, direktoro de Biblia Revuo; p. A. Ciccanti, prezidanto de UECI; D.ro Sergio Mariani, didaktika direktoro de la elementa lernejo «Oltresavio» en Cesena; p. G. Koritkowski, pola kapuceno, aŭtoro de «ekumenismo kaj internacilingva problemo»; sac. Bruno Benini, eklezia asistanto por uni-

versitata junularo. Pastro H. Paruzel, je la nomo de la polaj gesamideanoj, sendis ŝatatan telegramon kaj aŭdigis sian voĉon pere de magnetofona bobeneto per kiu li bondeziras sukceson al la kunveno kaj substrekas la gravecon de la tagordo: enkonduko de esperanto en la sacerdotajn seminariojn, fondo de IKUE-hejmo en Romo, eldono de la E-misalo kaj de ekukena biblio. Krome, li kore invitas la pastrojn partopreni en la simpozio kiu okazos de la 20 ĝis la 23 de venonota oktobro en Niepokalanoow, la Mari-hejmo de la beata patro Kolbe, patrono de la polaj Esperantistoj.

Deko da partoprenantoj vizitis la lio Biancheri al kiu oni donacis kelkajn esperantaĵojn inter kiuj «espero katolika», «katolika sento» kaj, je la ĉeesto de la aŭtoro mem p. Koritkowski, la interesan verkon «ekumenismo kaj internacilingva problemo».

Mons. Biancheri, ĉiam tre favora al esperanto-movado, dankis, gratulis la ĉeestantojn kaj agrable rememoris, ke li, verŝajne la unua en la mondo, en la jaro 1965 donis la permeson celebri en Rimini la sanktan Meson tute en esperanto, pri kio siatempe raportis inter alie la fama franca ĵurnalo «le monde». La kunvenintoj longe kaj serioze pridiskutis la proponojn laŭ la tagordo kaj tio certe multe helpis

por la solvo de la diversaj problemoj. Decidojn oni ne faris, sed unuanime oni aprobis la proponon aranĝi por la venonta Sankta Jaro en Romo, en la unua aŭ dua semajno de septembro, spiritajn ekzercojn por esperantistaj pastroj kaj simpatiantoj. Dum kvin sinsekvaj tagoj oni povos ne nur uzi la lingvon por kuncelebroj kaj primeditoj sed ankaŭ oni pli bone konatiĝos por pli efike kunlabori laŭ la celoj de IKUE.

Aparte oni ankaŭ parolis pri la starigo de franciskana rondo esperantista. Tio ĉi estas alia afero ol la IKUE-hejmo en Romo, sed, jam hodiaŭ estas ebleco por franciskana pastroj kunvivi kaj labori per kaj por esperanto en la sama monakejo kie loĝas p. Ciccanti en Rimini.

Kiam la franciskana rondo esperantista jam ekzistas, nur tiam estonte, ĝi mem juĝos kaj decidos laŭ la cirkonstancoj, ĉu resti en Rimini aŭ translokiĝi al Romo. Do, pastroj pretaj ĉu por la IKUE-hejmo en Romo ĉu por la franciskana rondo en Rimini, bonvolu vin anonci... ĉar ŝajnas, ke la unua ĉefa malfacilaĵo estas la manko de tiaj pretaj pastroj!

Pro tio, la esperantistaj pastroj estas petataj diskonigi la proponon en la diversaj landoj pere de la diocezaj gazetoj kaj pripensi la eblecon pasigi kelkajn monatojn aŭ

semajnojn aŭ tagojn en Rimini ĉe la monakejo S. Bernardino. Tio estos sendube utila ne nur por praktiki la lingvon sed precipe por provi antaŭ ol definitive decidi. Laste, ni sciigas, ke la programon de la kunveno antaŭe, kaj la raporton poste, oni sendis al ĉiuj italaj diocezaj kurioj kaj al diversaj gazetoj.

Tiel, oni pli facile atingas la pastraron kaj oni montras, ke la katolika movado esperantista estas organizita kaj agadas oficiale harmonie kun la eklezia hierarkio.

(p. albino ciccanti)

ETERNA SUPERSTIĈO

Ora monstranco
sub lumo de kandeloj
revas.

Ĝi estas Lanco,
kiun la Mezepoko
kontraŭ la nuna ekstravaganco
levas.

Ĝia ombro estas longa
ok jarcentojn.
Ĝi venkas mallumojn
kaj ventojn.

Ora monstranco,
la lasta
unika kaj granda
Ŝanco.

K. Piĉ

La Virgulino en Egiptujo *(daŭrigo)*

Kelkaj voĉoj de l' pli eminentaj okulaj-atestantoj:

Kopta episkopo Sam: «...La plej Sankta Virgulino aperis ĉi-tiu nokte je la 2.45 matene, kiel radiantanta figuro inter ia lumanta globo, sed mal-longe poste Ŝi malaperis.

Je la 4a horo Ŝi aperis ree kaj restis ĝis tagiĝo, cirkaŭ la 5a horo.

Tio estis subiganta, grandega aspekto! Ŝi paŝis al la okcidento, kelkfoje levante la manojn por beni kaj ĉe kio Ŝi klinis la kapon al la homoj.

Lumplena aureolo ĉirkaŭis ŝian kapon.

Kelkaj brilantaj kreitaĵoj similaj al kolomboj ĉirkaŭflugadis ŝin; ili ŝajnis kiel blaute lumetantaj steloj».

Episkopo Atanasio: «...Jam post sunleviĝo la homoj komencis voki: «La Sinjorino staras super la mez-kupolo!» Fakte, kvin aŭ ses metrojn supre la kupolo Ŝi staris tie en sia tutplena grandeco, lumanta kiel ia figuro, sed mova, viva, tiel la Viziaĵo men-kiel ankaŭ ŝia vestaĵo flir-tetis en la vento.

Mi staris antaŭ la figuro super la kupolo preskaŭ unu horon kaj en tiu tempo mi estis elpremita de amasoj ok-ĝis nau-foje; ĉi-tie estis malfacile certigi mian lokon, do poste mi ŝanĝis lokon kaj tie mi staris plue alian horon, de la 4a ĝis la 5a horo, profundigita en la rigardado de l' lumanta Viziaĵo. La Sinjorino turnis sin norden, faris signojn per mano kaj benis la homojn, ankaŭ tiujn en mia direkto.

Ŝi mem estis tute trankvila, plena de majesteco.

Ŝia vestaĵo moviĝis en la vento.

Tio-ĉi estis, mi devas akcenti, ia supernatura, vere ĉiela aspekto! En certa momento mi ekvidis ian strangan kolombon; mi ne scias de kie ĝi alflugis.

Ĝi flugis en la preĝejon kaj ree elflugis.

Pluaj helaj lumoj ekbrilis super ni. La homoj ĉirkaŭ ni preĝis.

Mohametanoj recitis versojn el Korano, Grekoj preĝis greke, aliaj kantis koptajn himnojn.

Ni ĉiu estis altiritaj de io, kio superis ĉian pur-homan travivaĵon kaj katenigis nin.

Jen mi staris tie kaj penis por distingi la vizaĝon, la trajtojn de l' Viziaĵo. Mi vidis ion ĉirkaŭ la okuloj kaj la buŝo, sed tio ne estis la propraj trajtoj.

Kvin minutojn antaŭ la 5a horo la Viziaĵo komencis paliĝi: la hela lumo ŝanĝiĝis unue en helan nubon kaj poste pli kaj pli paliĝis ĝis-ĝi tute malaperis.

Poste mi ankoraŭ tre ofte estis sur la loko de l' aperaĵo, sed ĉi-tiu aperaĵo postlasis en mi la plej grandan efekton».

Kelkaj fragmentoj el pli longa atesto de l' episkopo Gregorio: «...Mi men vidis la Sinjorinon ne malpli ol dek-foje.

Unufoje mi ekvidis sur la ĉielo kvazaŭ ian malfermaĵon kaj en ĝi aperis la Plej Sankta Virgulino.

Ŝi estis pli granda ol komuna virino, juna, bela, tute ĉirkaŭita per ia lumo... Sur la kapo Ŝi havis ion kvazaŭ vualon.

Ŝi rigardis la krucon sur la ĉef-kupolo.

Ŝi ne ŝajnis esti feliĉa, ĉar Ŝi havis la trajtojn de l' «Mater Dolorosa». Ŝi restis tiel cirkaŭ 2-3 horojn».

Katolika paroĥestro en Kajro: «De l' komenco mi estis konvinkita pri la vereco de l' aperaĵoj; la plej bona pruvo por tio estas, ke ĉiuj, mohametanoj, koptoj, katolikoj kaj protestantoj - ili ĉiuj estas identaj en iliaj atestoj». Ankaŭ multaj miraklaj-sanigoj apogis tion.

La opinioj kaj elparoloj de variaj estraroj en Egiptujo: - De la civila estraro: «Oficialaj ekzamenoj pruvis, ke la Sankta Virgulino... multfoje aperis en diversaj, hel-radiantaj formoj.


Ĉi-tiujn aperaĵojn multfoje akompanis hel-lumantaj kolomboj».

La protestanta estraro: «...La aperaĵoj de l' Sankta Virgulino apogas sin sur la vero».

Pozitiva estas ankaŭ la opinio de l' grek-katolika eklezio.

De la kopta patriarkato: «... kolektiginte ĉiujn informojn de l' propraj komisioj, de pastraro, privataj fideluloj kaj okulaj-atestantoj... ni proklamas kun profunda kredo, ĝojo kaj dankemo al Dio, ke la Plej Sankta Virgulino multfoje aperadis videble kaj evidente».

La katolika patriarko Stefano I: «...sendube ĉi-tie temas pri veraj aperaĵoj de la Plej Sankta Virgulino...».



VENO DE IA LOKO

La florvazo falis de la tablo.
 La advokato veturis de Parizo.
 Ni eliris el la urbo.
 La onklino revenis el Hispanio.

IRO AL IA LOKO

La prepozicioj uzeblaj kun libera akuzativo por indiki iron al loko estas: antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, ekster, en, inter, kontraŭ, post, sub, super, sur, trans.

Ekzemploj:

Li rapide metis ion en sian poŝon.
 La soldatoj sin ĵetis inter la malamikojn.
 Oni metis girlandon ĉirkaŭ la kolonon.
 La odoro eliris ekster la kelon.
 La promenantoj venis antaŭ la urbon.
 La hundo kuris post la rabiston.
 Rigardu malantaŭ (= post) la fornon.
 La florkultivisto ĵetis akvon sur la florojn.
 La aeroplano flugis super la maron.
 Pu ŝu benketon sub miajn piedojn.

La prepozicioj al kaj ĝis neniam havas akuzativon:

Ekz. La promenantoj venis al la urbo.
 La gejunuloj iras al la lernejo.
 La kunularo veturis de Genevo ĝis Lisbono.
 Post la prepozicioj preter kaj tra uziĝas direkt-akuzativo nur por indiki trapason.

MEDITOJ

NIA ĈIUTAGA PREĜO

Eloi Motillon

«Pater noster qui es in coelis»

«Patro nia, kiu estas en la ĉielo;»
 Tiujn simplajn vortojn mi ne povas
 Ne tremante! [diri
 Haltas mia preĝo antaŭ la rivelado,
 Ke al nia Patro povas ni aliri
 Plenfidante!

Min konfuzas la senlima Diboneco!
 Spite niajn pekojn, niajn malkonfe-
 Kaj ofendojn, [sojn,
 Vi ne lasas nin pereji en soleco,
 Ĉar indulgas Vi ame niajn la forge-
 Niajn plendojn. [sojn,

Vi senĉese vokas nin sendankajn fi-
 [lojn,
 Ĉiam preta nin akcepti kaj pardoni,
 Patro nia.
 Fratoj, ni forĵetu niajn malhumilojn,
 Ke ni povu nian amon al Vi doni,
 Patro nia.

«Santificatur nomen tuum»

«Sanktigata estu Via nomo»;

Prononcata estu ĝi adore.

Ĝi en ĉiu hejmo, ĉiu domo

Estu eldirita nur fervore!

Kunhomoj, gefratoj, vin gardu de
[blasfemo.

Ĝi estas atoma eksplodo pereiga,

Inside mortiga

por via intima, profunda, dia memo.

Vin gardu plej zorge de l' vorto kru-

[de sakra,

Misuzo kolera de l' sankta nomo

Ofendo malpia [Dia,

Al Patro ĉiela, insulto morde akra.

La sanktan Dinomon prononcu vi

[kun amo,

Respekto, kun danko gefila, rive-

[renco

Kaj pura intenco

Al gloro de l' Patro, Kreanto de l'

[vivflamo.



«Adveniat regnum tuum»

«Via regno alvenu».

Via justo deprenu

La doloron de l' mondo,

Kaj la pekon, l' angoron,

Kiuj premas la koron!

Kiel ŝipo blinde naĝanta sur maro
Meze de la ŝtormo senbrida, kolera,
Tiel blinde drivas senkada homaro
Sur oceano de vivo surtera.

Homoj malestime forpuŝas Dileĝon
Pro orgojlo kredis sin mastroj de
[l' mondo,

Kaj ignoris Kriston, sian Reĝon,
Ilin superfluas de peko la ondo.

Paco kaj feliĉo sur tero revenos,

Kiam ĉesos tiu malpia ribelo

Kontraŭ sankta Leĝo. Nur tiam nin

[benos

Nia Dia Patro, el Sia ĉielo.

Ni el koroj niaj orgojlon deprenu,

Ni aliĝu tute al Dia amleĝo,

Kaj efikos tiam miljara la preĝo:

«Via regno alvenu».

— *Ĉu ni renkontiĝos morgaŭ?*

— *Jes. kaj kie?*

— *Kie vi volas.*

— *Je kioma horo?*

— *tutegale.*

*Do bone, ni interkonsentis. Ĝis re-
vido!*



Kristina sidis hejme sur la kanapo kun
sia nova amato, kiu havas longajn ha-
rojn, kaj diras al li:

«Karulo, se hazarde miaj gepatroj re-
venus hejmen, diru ke vi estas mia
amikino».

landaj reprezentantoj

Aŭstralio

S-ro V.J. Timmins
73 Alexandria Parade
Hornsby N.S.W.

Aŭstrujo

S-ro W. Mudrak
Beatrixgasse 19/9
A-1030 Wien III - P.K. 105.713

Belgujo

S-ro Eugeen Paesmans
Lange Koepoortstraat 64
B 2000 Antwerpen, tel. 321751
P.K. 41 45 89

Brazilo

B.E.L. (Brazila Esper. Ligo)
Praça da Republica 54, 1e
Rio de Janeiro

Britujo

S-ro Norman W. Vigar
28 Franklands Drive, Weibridge
13000 Addlestone - Surrey (Anglujo)
KT 15 1 EG
tel. Weybridge (0932) 45743

Ĉeĥoslovakio

S-ro Aleš Berka
Na Harazi 1423
75501 Vsetín

Francujo

S-ro Gaston Veron
Place de la Petite Bruyère
F 61700 Domfront (Orne)
CCP Rouen 1188-63 Z

Germanujo

S-ro Gerhard Vogel
Tondernstr. 36
D 5 Köln 30 - P.K. Köln 166355

Hispanujo

S-ro Miguel Martinez
Av.da San José 105, Pral. 3a
Zaragoza

Irlando

S-ro O'Reilly P.J.
« Woodbine » Bluebell
Dublin 12

Italujo

D-ro C.C. Ferrari
Viale dei Mille, 37
I-20129 Milano - tel. 267895
P.K. 3-7791

Japanujo

S-ro Matubara Hatirô (Anselmo)
Namimatu-tyô, 4 ban, 5 gô
596 Kisiwada, Oosaka-hu

Jugoslavio

S-ro Ferenc Dongò
Javorska ul. 4
24413 Palič

Kanado

S-ino Pauline Proulx
790-80 E Rue Est
Charlesbourg, Québec

Kolombio

P. Louis E. Palacios Toral
Apartado Aéreo 12-03
Cartagena

Koreo

S-ro Paul Kiseng Kim
I. P. O. Box 2752
Seoul - South-Koreo

Madagaskaro

S-ro Ramanantsoa Claude
Dominique Gérard
Cité Ambohipo 469
Tananarive

Nederlando

S-ro S.P. Smits
Stadhoudersring 326
Zoetermeer
P.K. 68 51 24

Nov-Zelando

D-ro Hamway Johano
29 Arran str. Avondale
Auckland SW. 3

Polujo

Pola Katol. Unuiĝo Esper.
41800 Zabrze 1, skr pt. 68

Portugalujo

S-ro M. M. Lourenço Gouveio
Caixa Postal 456
Funchal-Madeira

Svislando

S-ro J. Lutz-Parolo
Himmelrichstr. 61
CH 6010 Kriens LU
P.K. 60-1739

Urugvajo

D-ro R. Zeballos Morales
Fray Marcos (Flor)

Usono

S-ro H. S. Corlett
7605 Winona Lane
Sebastopol, California 95472

**esordio
matro**

rajtigo de la tribunalo de milano n. 208
(27 majo 1971)
respondeca direktoro:
longoni ferdinando
via s. ambrogio 2 / tel. 9960050
I / 20051 limbiate (mi)
presejo: scuola grafica
istituto salesiano s. zeno
via minzoni 50
37100 verona

ekspedo per poŝtabono / gr. III/70